# A.E.A.-informilo

**Numero 6** **Aŭgusto 2009**


# 2009: Centjaro de Esperanto en Gijón kaj Asturio

Kiel sciate, la publika apero de la Internacia Lingvo okazis en la jaro 1887 per la eldonado de la unua gramatiko, kun prezento subskribita de D-ro Esperanto. Nur post tri jarojn jam estis en Hispanio intereso kaj aktivado pri Esperanto. Kaj en Asturio la intereso pri la afero manifestiĝis per artikoloj de kelkaj ĵurnaloj de la regiono en la unuaj jaroj de la 20a jarcento. Sed unua organizita E-rondo de Asturio estis fondita en la jaro 2009, konkrete la 4an de junio, en Gijón, kaj ĝia nomo estis **Astura Esperanta Asocio**. Dum la cent jaroj pasintaj de tiam la vivo de la E-movado en nia urbo kaj nia regiono ne estis facila, tamen dum tiu tempo neniam mankis ĉi tie ia esperantista tradicio kaj aktivado.

En la ĉi-jara asembleo de la membraro de nia Asocio oni pristudis la eblecon inde festi ĉi tiun Centjaron. Kvankam nia E-rondo estas modesta grupo kiu ne povas organizi gravan kaj brilan festadon, oni interakordis fari ĉion eblan por celebri tiel gravan okazaĵon.

La 4an de junio, ĝusta tago de la centjariĝo, nia Asocio sendis perInterrete mesaĝon al multenombraj (ĉiuj, kiues retpoŝtan adreson ni sukcesis havigi al ni) E-grupoj kaj asocioj en la mondo salutmesaĝon komunikante nian eventon kaj instigante ilin senlace labori favore al “la bela sonĝo de l’homaro” kiun konstituas nia afero.



## Astura Esperanta Asocio Centjara

1909 2009 100 jaroj astura esperanta asocio

Hodiaŭ, la 4an de junio 2009, la Esperantista grupo de Gijón (Asturio – Hispanio), **ASTURA ESPERANTA ASOCIO,** fariĝas centjara. Ja, ĝi estis fondita ĝuste antaŭ unu jarcento. Ĝi estis la unua esperantista rondo en nia urbo kaj en la Asturia regiono. Poste aperis aliaj E-grupoj tiel en la urbo de Gijón mem kiel en aliaj lokoj de la sama regiono. Iuj el tiuj grupoj malaperis kaj aliaj estis refonditaj, sed en nia urbo neniam mankis esperantista tradicio kaj aktivado laŭlonge de tiu jarcento, spite al ĉiutipaj malfacilaĵoj kaj la indiferento de socio kiu ne konscias pri la lingva problemo kaj ne estimas la utilon de la solvo proponita de L. L. Zamenhof.

Kadre de la celebrado de nia centjariĝo, la sekva numero de **HELECO**, la presorgano de nia Asocio, kiun ni estas preparante, prirakontos la historion de **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** kaj ĝenerale de la esperantismo en nia urbo kaj nia regiono laŭlonge de tiu jarcento. La revuo estos publikigita en nia interreta paĝo:

http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/

kie estas jam la antaŭaj numeroj, kune kun aliaj materialoj.

Okaze de sia Centjaro, **ASTURA ESPERANTA ASOCIO** sendas fratecan saluton al ĉiuj geesperantistoj en la mondo, kiuj agadas, en simile malfacilaj cirkonstancoj, favore al la nobla idealo de la intergenta paco kaj la homa interkompreno.

Ni instigas nian diligentan kolegaron, ke ili

**en laboro paca ne laciĝu**
**ĝis la bela sonĝo de l' homaro**
**por eterna ben' efektiviĝu.**

Ĉi paĝe ni montras la bildon de tiu mesaĝo. La mesaĝon mem oni povas vidi (kaj aŭdi) en nia retpaĝo, konkrete en la subpaĝo kies adreso estas:

**http://carleos.epv.uniovi.es/~faustino/centjaro.html**

Ni volis diskonigi inter la ĝenerala publiko, pere de presaro, la fakton de nia Centjaro samtempe ke tio konstituas ankaŭ publikan propagandon tiel pri Esperanto kiel pri nia E-grupo kaj la kursoj kiujn ni organizas. En la demarŝoj por interrilati kun la amas-informiloj: tre utilis al ni la helpo de S-ino Susana Dominguez. Dank’ al ŝi, la Radio-stacio de la Asturia Princlando, **RTPA**, emisiis intervjuon farita al la Prezidanto kaj al la Sekretario de **Astura Esperanta Asocio**. Tio okazis la 3an de julio. La 10an de aŭgusto la ĵurnalo ***La Nueva España*** publikigis artikolon pri Esperanto kaj nia **Astura Esperanta Asocio**. Ĉi foje temis pri raporto kin informo, kiun ni provizis, skizante la historion de la esperanta movado en Gijón laŭlonge de la lasta jarcenta periodo, kaj estis ankaŭ intervjuo al samideano José Palacio Tuero, membro de nia Asocio kaj plej antikva esperantisto en Asturio.

Aliaj programeroj de nia festado de la Centjaro estis la speciala numero de la revuo Heleco kaj renkontiĝo-vespermanĝo de la asturaj geesperantistoj. Pri ambaŭ okazaĵoj ni informas en la sekvaj paĝoj de ĉi tiu ***Informilo***.